

La revuo *La Revuo* redaktita de Charles Boulet kaj la Floraj ludoj  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 707, 1977.04.27 & 29 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Antaŭ ekzakte sepdek jaroj naskiĝis la prestiĝa literatura periodaĵo *La Revuo* redaktita, ĝis lia tragika kaj tro frua morto en aŭgusto 1913, de Charles Bourlet kaj eldonita en Parizo de la fama Hachette.

Cl.- En sia unua numero *La Revuo* anncis la starigon de literatura konkurso. La rezultoj estis proklamitaj kaj la premioj disdonitaj en Kembriĝo en la kadro de la 3-a Universala Kongreso la 17-an de aŭgusto 1907. Ĉar Zamenhof esprimis la esperon, ke nova konkurso baldaŭ okazos, por ke simila festo rekomenciĝu, *La Revuo* lanĉis ne unu, sed tri konkursojn : proza, referendumaj kaj versfarada. Notinde estas, ke la dua konkurso celis difini, kiu tiutempe estis la plej bona stilisto-literaturisto en esperanto. Kazimierz Bein aŭ Kabe estis tiel premiita per 194 el la 267 esprimitaj voĉoj. Se oni konsideras, ke Valienne okupis la duan viclokon kun 31 voĉoj, oni povas ja rimarki la triumfon de Kabe.

A.- Kiam estis decidite, ke la 5-a Universala Kongreso okazos en Barcelono, en la decembra numero de 1908 Karlo Bourlet anoncis, ke la kongreskomitato proponis la kunfandon de du tradicioj : la kataluna, ekzistanta jam de jarcentoj kaj nomata « floraj ludoj », kaj la trijara literatura konkurso de *La Revuo*, por ke ili fariĝu la « *Unuaj Esperantistaj Floraj Ludoj* ».

Cl.- De la 8-a ĝis la 14-a de majo 1909 Karlo Bourlet akompanata de barono de Ménil, administranto de la gazeto *Franca Esperantisto*, vizitis Barcelonon okaze de la 51-a festo de la katalunaj Floraj Ludoj. Oficiale invititaj ili honore sidis sur la podio ĝuante la eksterordinaran eventon kaj revante pri sama majesta ceremonio por la unuaj esperantistaj Ludoj disvolviĝontaj 4 monatojn poste en la sama ejo.

A.- Reprenante sian postenon en Parizo Karlo Bourlet akcelis la preparon de la literatura konkurso. La tri elektitaj temoj estis **Amo**, **Homaro** (anstataŭ Patrujo en la katalunaj) kaj **Fido**, premiotaj per, laŭvice, bukedo de naturaj floroj, ora lilieto, kaj arĝenta violo. La juĝantaro konsistis el famaj esperantistoj, plejparte apartenantaj al la Akademio de Esperanto. Alvenis entute 275 manuskriptoj. La rezultoj kaj decidoj restis konfidencaj ĝis la kongresa festo. La solenaĵo okazis, kiel programite, la 8-an de septembro 1909. Jen kiel Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux en la aprila numero de *Literatura Foiro* priskribas tiun ĉi neordinaran solenaĵon :

Cl.- « *Je la kvara posttagmeze de la merkredo, solene eniras la tuta urbestro de Barcelono, la Prezidanto de la kataluna deputitaro, Doktoro Zamenhof, la esperantaj akademianoj, la juĝantaro. Ĉiuj supreniras la podion kaj eksidas ambaŭflanke de la vaste orumita trono ĉirkaŭata de la urbaj rajdistoj en luksa uniformo.*

A.- *Maldekstre de la ankoraŭ nekonata Moŝtulino, sin lokas Doktoro Zamenhof kaj la Esperantaj eminentuloj kaj dekstre la civilaj aŭtoritatoj.*

Cl.- *Post kiam la urbestro deklaris en Esperanto la feston malfermita, Karlo Bourlet salutas lin, liajn konsilantojn, la katalunajn deputitojn kaj, per vibranta voĉo, esprimas la dankojn de la esperantistaro akceptita kun tia honoro en la salono tradicia de la Katalunaj Floraj Ludoj.*

« Vi donis al ni la plej valoran signon de via estimo por Esperanto. [...] Vi komprenis, ke Esperanto estas unu lingvo vere vivanta [...] kun naskiĝanta literaturo. »

A.- Poste, Rektoro Boirac anoncas, ke Doktoro Artigues, ĉeflaŭreato de la unua literatura konkurso de **La Revuo**, malfermos la koverton entenantan la nomon de la gajninto de la unua premio por poezio pri **Amo**.

Cl.- Laŭtradicie, la unua premiito de la poezia konkurso pri **Amo** devas tuj elekti sinjorinon kiel **Reĝinon de la festo**. La reĝino prezidas la feston kaj disdonas la premiojn. Por la unua fojo la tradicio aliel disvolviĝas, ĉar la nomo, kiun legas Doktoro Artigues por la unua premio estas tiu de sinjorino Marie Hankel el Dresdeno !

A.- Post longa kaj tondra aplaŭdo, procesie la esperantista eminentularo iras inviti la **Reĝinon** supreniri la podion. Je la brako de Rektoro Boirac, meze de emocia entuziasmo kaj vivuoj, la Reĝino paŝas al sia trono. Gabriel Chavet per tonoriĉa voĉo interpretas la premiitan verkon :

Cl.- Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian,  
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,  
Pro amo mi miajn floretojn defendos,  
Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.

A.- Antoni Grabowski, kiu prezidis la poezian fakon de la **Ludoj**, klarigas la signifon de tiu nomo. Edmond Privat kaj Clarence Bicknell – kies poemoj ricevis ankaŭ premion – legas siajn verkojn kaj ricevas ovacion. Post dankaj vortoj de Karlo Bourlet la urbestro leviĝas kaj en Esperanto deklaras, ke la festo estas finita.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Claude kaj Andrée Gacond citis erojn el artikolo de *Literatura Foiro* pri la unuaj esperantista floraj ludoj. Ĝis reaŭdo !

---

Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012